# La Blanka Rozo

Revuo de la
**FEDERACIO ESPERANTISTA DE YORKSHIRE KAJ HUMBERSIDE**

**N-ro 278** **AŬTUNO 2017**

## ✝MARJORIE BOULTON
## 1924-2017

Kun granda bedaŭro ni aŭdis pri la forpaso de D-ino Marjorie Boulton, en Oksfordo je la 30a de aŭgusto. Ŝi havis 93 jarojn.

Marjorie Boulton estis internacie konata en Esperantujo kiel verkisto de poemoj, dramoj, noveloj, rakontoj kaj eseoj. Elstaris inter ŝiaj verkoj la biografio *Zamenhof, aŭtoro de Esperanto.* Krom tio ŝi daŭre kaj senlace laboris en kaj por la internacia lingvo. Ekde la 1970aj ĝis la 1990aj jaroj ŝi gvidis la Somerlernejon en Barlastono. Studintoj memoros ŝin kiel atentema, kuraĝiga kaj sprita instruisto. Bone mi memoras komenton ŝian: "Gramatiko estas kiel kloako; ĝi ja necesas, eĉ se ĝi malagrablas."

Dum maljunaĝo ŝi ankoraŭ restis aktiva. Antaŭ la Brita Kongreso en Scarborough en 2006 mi iom hezite skribis al ŝi por peti ŝin prezenti ion ĉe la Distra Vespero. Ŝi tuj konsentis, skribante: "Mi volas ne nur sidi kaj aŭdi, mi volas ankaŭ kontribui al la programo." Kaj tion ŝi ja faris - en Scarborough kaj ĉiuloke.

Funebraĵo kaj enteriĝo okazis en Oksfordo je la 9a de oktobro. Pli pri tio legeblas sur paĝo 2.

*Jack Warren*

---

## ESPERANTO-TAGO EN CONWY
### *Urbestro aperas en plena insignaro*

Bone konata inter ne-plu-junaj britaj esperantistoj estas la nomo de Horace Barks, urbestro de Stoke-on-Trent, kiu antaŭ kelkaj jardekoj aktive varbis por la internacia lingvo. Ekde tiam maloftas E-urbestroj . . . ĝis Bill Chapman enposteniĝis en Conwy kaj invitis nin al Esperanto-Tago en 'lia' nordkimra urbo.

Pro tio komenciĝis la tago laŭ aparta maniero. Partoprenontoj ariĝis en la granda, eleganta Konsilantara Ĉambro de la urbodomo, kie la urbestro bonvenigas ilin portante la ĉapelon, ruĝan mantelon kaj katenon de sia ofico. Ĉirkaŭ duono de tiuj homoj restis tie por la diskutrondo (*Drondo*), kiun gvidis Tim Owen. Oni pritraktis precipe la influon de Prezidento Trump sur usonaj kaj internaciaj aferoj, kaj la 'briteliron' el la Eŭropa Komunumo. Kiel kutime estiĝis viglaj debatoj je alta intelekta nivelo. Tim Owen komentis:

*Belis la ĉirkaŭaĵoj kaj ĉirkaŭuloj, kaj aparte bele estas la surprizo, ke tiom da homoj partoprenis. Ni aranĝante esperis bonvenigi, se ni estos aparte bonsanĉaj, eble 10 aŭ 12 homojn. Evidentiĝis post lunĉpaŭza kapkalkulo, ke oferis sian semajnfinan malfruan ellitiĝon 25. Tiel laŭ normoj dum la lasta jardeko, oni povus paroli pri duonkongreso!*

Ne mapli vigla, sed alieca, estis la etoso en la apuda ĉambro, kie Jack Warren prizorgis la t.n. 'komencantojn.' La priskribo trompis. Kelkaj jam bone regis la lingvon kaj eĉ portempe transiris al la apuda ĉambro por drondumi. Aliaj studis la lingvon antaŭ jardekoj sed multon forgesis. Restis 5 veraj komencantoj, el kiuj du estis 6-jaraĝaj infanoj. Kion fari?

*(daŭrigata sur paĝo 2)*

*(daŭrigata de paĝo 1)*

Do, oni faris taskojn ĉetable, sed ankaŭ ĉirkaŭiris en la ĉambro, serĉante la respondojn al diversaj demandoj per studado de bildoj, kiujn la helpemaj lernantoj mem metis sur la murojn. Sekvis speco de 'organizita ĥaoso,' el kiu espereble ĉiuj ion lernis.

Meztage ni eliris al apuda restoracio por lunĉmanĝi. Ĉiu ricevis grandan porcion de la tradicia fromaĝo laŭ kimra maniero (fandita, sur rostita pano.) Bone, ke estis tiaj paŭzoj dum sufiĉe postulema programo. Simile malstreĉiga devus esti la posttagmeza promeno. Kuŝante inter montoj kaj maro, Conwy estas bela urbeto el ŝtono, kun grandega mezepoka kastelo kaj sendifektaj urbolimaj muroj. Oni povas imagi, ke York iom tiel aspektis dum la 18a jarcento, antaŭ la alveno de la fervojo. Sed ho ve! La promenantoj nenion spertis de ĉio ĉi, luktantaj kontraŭ pluvego kaj ŝtormvento sub grizaj ĉieloj.

Reveninte al la urbodomo oni konsolis sin per varmaj trinkaĵoj. Bill Chapman tiam prezentis al ni la artaĵojn de la urbodomo. En pentraĵoj de urbo kaj kamparo videblis la vivmaniero de la pasinteco: violonludado ĉe edziĝfesto, kimrinoj kun altaj ĉapeloj. Imponis min granda bildo de la kastelo kaj ĝia pendponto, farita entute kiel moziako el lignopecoj.

Tiel estis la unua Esperanto-Tago en Conwy, sed espereble ne la lasta, se ĝi trovos lokon en la kalendaro de BEA-eventoj. Elkoran dankon al Bill kaj Pat Chapman, kiuj starigis la eventon kaj tiom faris por gastigi ni.

*Jack Warren*

---

# FUNEBRAĴO DE MARJORIE BOULTON

Ĉirkaŭ 30 homoj, inter ili 3 el Jorkŝiro, kuniĝis en la rusa ortodoksa Preĝejo de Sankta Nikolao la Miraklisto en Oksfordo por adiaŭi al Marjorie Boulton. Plejparte ĉeestis Esperantistoj de certa aĝo, kun iom da amikoj, najbaroj kaj paroĥanoj.

Alveninte tie, ĉiu ricevis kandelon; tiu ekbruliĝis kaj oni tenis ĝin en la mano ĝis la fino de la funebraĵo. Kaj pastro kaj paroĥanoj daŭre kantadis, bele kaj preskaŭ seninterrompe. John Wells faris panegiron pri D-ino Boulton, emfazante ŝiajn personajn fortojn kaj grandan kontribuon al la kulturo de Esperanto. Poste serviĝis kuketsimilan dolĉaĵon, kiun oni manĝis en la enirejo antaŭ ol foriri.

Enteriĝo okazis ĉe la tombejo Wolvercote, nelonge for de la preĝejo. Ankaŭ tie kantis la paroĥanoj. Sekvis funebra festo ĉe Somerville College, kiun ĉeestis plejparte Esperantistoj por regaliĝi per vino kaj sandviĉoj.

*Jack Warren*

---

## *"Ho Somerkurs' en Barlastono . . ."*

Tiel la kantoteksto pri tiu evento, pri kies aŭtoro mi modeste silentas. Por la dua fojo ĝi okazis dum semajnfino. Progresantojn instruis Jack Warren, progresintojn Bill Chapman.

La Somerlernejon ĉeestis precipe britoj, sed inter la progresantoj estis Antony Bodineau, denaska franco, kiu jam delonge loĝas en Londono, Sophie Horrocks el Hispanio, sed survoje al nova posteno ĉe la Esperanto-Asocio de Bretonio, kaj Anna Langley, antaŭa enloĝanto de Aŭstralio; do tamen regis internacia etoso.

Kontentiga estas, ke tiom da homoj nun eklernas Esperanton interrete kaj poste trovas la vojon al tiaj eventoj por sperti vidalvidan kontakton kun parolantoj de la internacia lingvo. Jen bona indiko por la estonteco.

*Jack Warren*

# RECENZOJ PRI LABORPOSTENOJ - KIAL NE?

Mi konfesas: mi neniam estis dunganto, do ne devis alfronti la problemojn proponi postenojn al aliuloj, certigi, ke ili ne priŝtelas min aŭ laŭleĝe maldungi netaŭgulojn. Tamen ŝajnas al mi, ke nuntempe dungitoj ofte misuzas sian potencon. Havante grandan elekton inter multaj senlaboruloj, ili emas maltrakti ilin. Kandidatoj prezentante sin devas danci aŭ kanti popkantojn; dungite, ili submetiĝas al senĉesa gvatado per kameraoj; la rezulto de ia plendo povas esti tuja maldungo. Kiu defendas ilin en tiaj situacioj?

Mia filino Natalie - post sperto de diversaj laborpostenoj - proponas interretan servon simila al tiu de la retejo *Tripadvisor,* kiu montras la recenzojn de gastoj pri hoteloj lastatempe vizititaj. Feriontoj povas tiam decidi pri la elekto de bona hotelo. Ankaŭ laborserĉanto bezonas pli da informoj pri iu posteno ol la malprecizaj memflataĵoj en la reklamo. Dunganto foje postulas detalajn informojn pri kandidato, eĉ antaŭ invito al prezenta ekzameno; ĉu ankaŭ kandidato ne rajtas ion scii pri la laborloko, antaŭ ol prezenti sin tie?

Do, bezonata estas retejo, kiu montras komentojn de dungitoj, antaŭaj kaj nunaj, pri ecoj de la posteno, kiujn kandidato devus scii antaŭ ol kandidatiĝi. Jen kelkaj ekemploj.

- Pago, deĵorhoroj kaj ferioj
- Kio okazos, se mi malsanas?
- Kia estos mia labormedio?
- Kiaj estos miaj kunlaborantoj?
- Ĉu vi ion scias nun pri la posteno, kiun oni prisilentis, antaŭ ol vi akceptis?

Foje estas plendoj, ke oni ne povas fidi la kontribuantojn. Iuj povas esti maliculoj, kiuj volas saboti entreprenon pro personaj kialoj kaj misuzas la servon tiucele. Do kontribuontoj devus unue respondi al kelkaj sekurigaj demandoj por pruvi, ke ili vere laboris ĉe la loko prikomentota.

Per tia retejo kandidatoj farus por si pli klaran kaj justan bildon de kiel estas labori en certa loko. Dungantoj esperos ricevi bonajn recenzojn, kaj do - espereble - pli bone traktos siajn dungitojn. Jen, eble, plibonigo por maljusteco, kiu aparte trafas junulojn.

*Sproto*

---

# KLARECO CELAS KLARECON

Jam aperis novaĵraportoj pri la publicista firmao *Bell Pottinger*, kiu laŭdire servis la interesojn de la riĉa kaj potenca familio Gupta en Sudafriko. Tiuj siavice estas subtenantoj de Prezidento Zuma kaj oni akuzis ilin pri provokado de interetna malakordo en tiu multetna lando.

Pro la sekva skandalo la azia filio de Bell Pottinger, kun ĉefsidejo en Singapuro, decidis distanciĝi sin per la nova marknomo *Klareco.* Laŭ kunfondinto Piers Pottinger "Esperanto estas la internacia lingvo de espero kaj harmonio . . . Ni elektis ĝin ĉar ĝi spegulas niajn verajn valorojn . . ."

Ĉu tiu elekto taŭgis? Ĉu ĝi reprezentas rekonon por nia lingvo? Ni vidos.

*Gudrulo*

# EKSKURSETO AL NORTHALLERTON

***Deak Kirkham** lernis Esperanton tre rapide kaj partoprenis sian unan Britan Kongreson en 2016 en Liverpolo. Ekde tiam li multe aktivas en la jorkŝira federacio, kaj en aŭgusto ĉeestis la Somerlernejo en Barlastono. Jen lia unua kontribuo al nia revuo.*

Longa, rekta, vasta strato; imponaj, kvadrataj konstruaĵoj el la 18a jarcento – tiel grandaj, kiel la strato mem; blua, preskaŭ sennuba ĉ ielo. Tiel estis Northallerton je mezjulia tago kiam Jack Warren kaj Deak Kirkham renkontiĝis unu la alian por 'neoficiala' kunveneto de la jorkŝira federacio kun du tute Zamenhofaj celoj: unue, komuniki per la internacia lingvo; kaj due, renkontiĝi amike kaj malfermkore por esplori, babili kaj amuziĝi.

Northallerton estas la administra ĉefurbo de Norda Jorkŝiro. Laŭ la brita popolnombrado de 2011 ĝi estas la kvara plej homplena urbo en Norda Jorkŝiro (escepte de la urboj sendependaj, ekzemple Jorko kaj Middlesbrough) post Harrogate, Scarborough kaj Selby. Facile alirebla per trajno aŭ buso, ĝi datiĝas de la romia epoko. Vilhelmo II, angla reĝ o, kiun mortigis mistera sago, donacis la urbon al la episkopo de Durham.

Sabate, la tagon de la Jacka-Deaka kunveneto, Northallerton aparte fieras pri ĝia surstrata bazaro. La vasteco de la centra strato iĝas tumultmovada, multkolora kolekto. Sed, estantaj normalaj viroj, ni nek malkovris plu pri la historio de la urbo, nek ĉirkaŭ piediris la komercejon, sed tutsimple sidiĝis en la restoracio *Betty's*, kie ni tagmanĝis ĝis satiĝo, babilis amike kaj Esperantologiumis zamenhofe! Bedaŭrinde ni ne sukcesis trovi alia(j)n Esperantisto(j)n, sed ni prezentis nin al la servistino kaj priparolis tion, kio estas Esperanto. Ŝ i diris, ke ŝi neniam aŭdis pri ĉi tiu Esperanto, sed esploros ĝin kiam ŝi reiros hejmen.

Kelkaj lastaj pensoj: praktika propono. Esperantistoj devas esti praktikaj! Nia movado ne estas nur ideologia afero, sed konkreta, aktuala vojaĝo. Do, mi proponas aliajn jorkŝirajn aventurojn, apud kaj kune kun la normalaj jorkŝiraj federaciaj ekskursaj tagoj. Eble ni povus renkontiĝi unufoje monate (aŭ sesfoje jare), ĉiam en malsama jorkŝira urb(et)o. Ni povus eĉ kunpreni iom da Esperantaj anoncoj kan enmanmeti ilin preter la centra strato; aŭ eĉ kanti esperantajn kantojn plenaere; aŭ marŝi laŭ la strato kun Esperantaj flagoj. Aŭ kiel Jack kaj Deak ĉe Northallerton, ni povus tutsimple trovi bonan manĝolokon kaj, je la nomo de Zamenhof, elpreni magiaĵojn parolante nian belegan internacian lingvon.

---

## Konsilo pri sano kaj dieto

1. La japanoj manĝas ege malmulte da graso kaj suferas malpli da koratakoj ol usonanoj.
2. La meksikanoj manĝas multe da graso kaj suferas malpli da koratakoj ol usonanoj.
3. La ĉinoj trinkas ege malmulte da ruĝa vino kaj suferas malpli da koratakoj ol usonanoj.
4. La italoj trinkas multe da ruĝa vino kaj suferas malpli da koratakoj ol usonanoj.
5. La germanoj trinkas multe da biero kaj manĝas multe da kolbasoj kaj suferas malpli da koratakoj ol usonanoj.

KONKLUDO
Manĝu kaj trinku laŭ via plaĉo. Mortigas vin ŝajne la parolado de la angla lingvo.

***Recepto:***

## FIŜRIZAĴO

**kun salmo kaj salikokoj**



La origina, guĝarata *kiĉeri* estas rizaĵo kun lentoj. Angloj aldonis fumaĵitan fiŝaĵon kaj servis ĝin kiel matenmanĝa (!) plado. Tiu recepto taŭgas kiel tagmanĝo, laŭ mi eĉ por regali gastojn. Ne fortimiĝu pro ĝia longeco; efektive ĝi estas tre simpla kaj bezonas malmulte da tempo.

Bezonatas:

1 servokulero da oleo
1 tekulereto da karea pulvoro
1 ajlero, hakita
1 cepo, hakita
130ml da buljono aŭ akvo
200g da salmo, senostigita
50g da pizoj frostigitaj
citronsuko
2 ovoj, boligitaj
Salo kaj pipro laŭ gusto

*daŭrigata dekstre:*

---

*kaj por la saŭco:*

1 servokulero da oleo
1 servokulero da faruno
250g da lakto
100g da salikokoj, kuiritaj
Salo kaj pipro laŭ gusto

1. Boligu rizon kaj flankenmetu ĝin.
2. Senhaŭtigu salmon, tranĉu en kubojn.
3. Varmigu oleon en kaserolo. Fritu karean pulvoron dum mallonga tempo. Aldonu cepon kaj ajleron kaj fritu ĉion kune.
4. Enverŝu akvon aŭ buljonon kaj kuiretu kelkajn minutojn.
5. Enmetu salmon kaj pizojn, reboligu kaj kuiretu sub kovrilo 10 minutojn.
6. Kirlu rizon kaj enmiksu en la kaserolon, tiel ke la salmokuboj ne dispeciĝas. Remetu kovrilon kaj tenu varme.
7. Varmigu oleon en malgranda pato. Aldonu farunon, salon kaj pipron kaj varmigu, daŭre kirlante, ĝis la saŭco dikiĝas.
8. Enkirlu salikokojn, kuiretu 1 minuton.
9. Revarmigu kaj servu kun saŭco apude.

*Jack Warren*

## EVENTOJ

Novembro 4 Federacia kunveno,
York - vidu supre

Decembro 15 Libro-tago de Esperanto.
Festu la naskiĝtagon de Zamenhof per libroaĉeto!

2018
Aprilo 19-21 Brita / Tutkelta Kongreso,
Aberystwyth

Por pli da informoj pri tiuj eventoj iru al la EAB-retejo - aŭ kontaktu la redaktoron.

## FEDERACIA KUNVENO EN YORK

La aŭtuna kunveno okazos je **sabato la 4a de novembro 2017,** je **13 30** ĉe la klubo Guppy's Enterprise Club, 17 Nunnery Lane, York. Manĝetoj kaj trinkaĵoj estas aĉetebloaj, aŭ kunportu varman trinkaĵon.

**TAGORDO**

| | |
|---|---|
| 13 30 | Bonvenigo |
| | Pardonpetoj |
| | Protokolo kaj akcepto |
| | Aferoj leviĝantaj |
| | Venontaj kunvenoj |
| | *Blanka Rozo* |
| | Aliaj aferoj |
| | Konversacia rondo* |
| 16 30 | Fino |

*inkluzive de lingvoludoj kaj - laŭvole - kunkantado.

## Vortrado

Uzu la literojn en tiu rado por fari vortojn kun finaĵoj *-o*, *-a* aŭ *-i*. Ĉiu vorto devas esti almenaŭ trilitera kaj enhavi la literon meze de la rado. Uzu ĉiun radikon nur unufoje. Propraj nomoj estas malpermesataj. Litero povas aperi plurfoje en unu vorto. Eblas fari almenaŭ 40 vortoj.

**D L**
**I G**
**A**
**M R**
**O A**

## Anagramoj: famuloj el p.i.v.

Uzu la literojn por deĉifri la nomojn - en Esperanto - de dek du internacie konataj famuloj. Ĉiu nomo konsistas al nur unu vorto kaj aperas en la *Plena Ilustrita Vortaro.*

1. ERKA ZITO ...............................................
2. NOPI ŜUK ...............................................
3. SPRE AŬTO ...............................................
4. EVENTO BO ...............................................
5. LEONO PANO ...............................................
6. ECO FUNKO ...............................................
7. ĜANKO ELMILE ...............................................
8. LEO RIMO ...............................................
9. JOTO LOST ...............................................
10. HITA PORKO ...............................................
1I. ELSA KRADNO ...............................................
12. DIKO LEŬ ...............................................

### *Solvo por krucvortenigmo en numero 277*

**Horizontale:** 8. Rubando 9. Aludi 10. Breto 11. Opaleca 12. Ikon' 13. Plagiati 16. Orkestro 19. Band' 22. Kapitan' 23. Torak' 24. Prior' 25. Monarko

**Vertikale:** 1. Kribrilo 2. Ebleco 3. Anton' 4. Monokl' 5. Falango 6. Ludema 7. Tipa 14. Indeksoj 15. Esotera 17. Kapital' 18. Renomo 20. Apraro 21. Ŝtono 22. Kapo

***La Blanka Rozo*** estas la revuo de la Federacio Esperantista de Jorkŝiro. Ĝi aperas trifoje jare: jarabono £6.00. **Redaktoro:** Jack Warren, 11 Linden Grove, Linthorpe, Middlesbrough TS5 5NF. Tel. 01642-82 76 79, rete: p.warren1947@gmail.com. **Federacia Prezidanto:** Jack Warren. **Protokola Sekretario:** Gillian Cartledge, 175 Hunter House Road, Sheffield S11 8TZ. **Kasisto:** Angus Wilkinson, 59 Cross Hills Lane, Selby Y08 4RU. Tel. 01757 210375, rete: angus.wilkinson@sky.com .